

Agnes Miegel,  
Septembro

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Jen la plej karaj tagoj en la jar':  
Asteraj floras ĉie en la bedoj,  
Trankvilas la aer', la blua klar'  
Plenplenas de l' odoro de l' rezedoj.

Ne sonas flugilbato tra l' trankvil';  
Nur la cikadoj ĉirpas en la paco.<sup>2</sup>  
Nun, sata de la mondo, de l' sunbril',  
Animo laca, en vespera bril'  
Transiĝu al de l' lasta dormo graco.

*Traduko de la Germana poemo "September" de AGNES MIEGEL (\*1879-03-09 – †1964-10-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1998-09.*

*MR-314-1a / Arg-787-1577 (2013-01-21 21:02:40)*

*Pri la poetino legu ankaŭ jenan artikolon: <http://www.agnes-miegel-gesellschaft.de/biographie/index.html>.*

---

<sup>2</sup>aŭ:  
Ĉirpadas la cikadoj nur sen laco.